

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2021-04-15 ĝis 2021-07-15.

Eventoj

54-a ILEI-Kongreso 2021

ĈIUJ INFORMOJ TROVIĜAS EN JENA RETEJO:

[VEKI 2 – La 54-a ILEI-Kongreso \(esperantujo.io\)](https://ilei.esperantujo.io)

Malgraŭ malfacilaj cirkonstancoj preparado de VEKI-2 survojas.

Por IPR 2021/2 estis preparita baza informo pri la kongreso, tamen ne definitive tiam pro la neklara pandemia situacio. La havebla informo aperis ankaŭ en la grupoj de ILEI en sociaj retoj. Dekomence la Estraro planis okazigi la 54-an ILEI-kongreson-2021 paralele en du formatoj: fizike kaj virtuale. Tamen fine de majo jam estis evidente, ke la fizika kongreso ne povos okazi pro tre malmultaj aliĝoj. Tial la Estraro definitive anoncis, ke en 2021 okazos nur VEKI-2: la Virtuala Esperanto-Kongreso ILEI. La kongresa temo restas : “Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj”. Tamen Benino restos en la fokuso, precipe en la Nacia vespero. La anonco estis vaste diskonigita komence de junio. Estis kreita aparta laborgrupo por pretigo de la kongresa programo, la preparado de la simpozio survojas, teknika flanko estas en la manoj de Unika.

Aprile Unika kunlabore kun Radojica Petrović starigis retejon por la ILEI-simpozio <https://ilei.esperantujo.io/simpozio2021>.

Maje-junie Unika kreis la retejon por VEKI-2.

Fine de majo estis preta enhavskemo por la simpozio dum VEKI-2, poste estis traktataj demandoj pri la laborlingvoj kaj tradukmanieroj. La informo estis vaste diskonigita tra kanaloj de ILEI kaj UEA.

Kunlabore kun UEA estis preparata AMO-76 por la kongreso. Ĉi-foje ĝi havos du temojn: « Efika instruado de Esperanto en Afriko » kaj “Edukado pri / al / per Esperanto-kulturo”.

Junie estis traktataj demandoj pri anstataŭigo de la komitatanoj kaze de ilia neĉeesto dum la virtualaj komitatkunsioj. Tia anstataŭigo eblas inter membroj de la sama sekcio.

Komence de junio estis aprobita la emblemo por VEKI-2, kreita de Unika. Junie la Prezidantino vaste dissendis la alvokon por prezenti prelegon por VEKI-2021.

Junie dum la estrarkunsido estis traktitaj kaj deciditaj kotizoj por VEKI-2021, inkluzive diversaj kategorioj de la partoprenontoj, kontribuontoj al la programo kaj subvenciataj personoj.

Ĉefprizorgantoj pri la programo de VEKI-2 estas Marija Belošević (Kroatio) kaj Mireille Grosjean.

Paralele, kiel kutime, Marija Belošević preparis la programon de la Tago de Lernado dum VK de UEA.

La Estraro

Prepare al VEKI-2 kaj al la tiama komitatkunsido la Estraro organizis kontroladon de la membronombroj laŭ la landoj cele al kontrolo de la konsisto de la Komitato. Regule okazas virtualaj estrarkunsidoj.

Sekcioj

Prepariĝante al la Komitatkunsido dum VEKI-2, ankaŭ la sekcioj kontrolas siajn statojn kaj anoncas modifojn.

Kapabligo

La trijaraj studoj en **Poznan pri Interlingvistiko** komenciĝos en septembro 2021. Bonvolu konsideri vian aliĝon. Dum la tria jaro eblos studi pedagogion kaj metodologion kaj akiri diplomon de Eo-instruisto. Jen informoj pli detalaj:

Jxus aperis varbfilmeto por la nova interlingvistika grupo:
<https://www.youtube.com/watch?v=-cvm2ybeKcs>

Vi povas trovi informojn en: <https://edukado.net/novajhoj?id=849> kun aliaj filmetoj kaj en la retejo de la studoj: <http://interl.amu.edu.pl>

Intervjuo kun la gvidanto de la Studoj en: http://pola-retradio.org/2021/04/e_elsendo-el-la-07-04-2021/

Prezento de la Interlingvistikaj studoj fone de universitata instruado:
<https://esfconnected.org/2021/07/09/interlingvistikaj-studoj-uam-poznano-pl/>

Se vi bezonas pluajn informojn au volas aligxi, skribu al: interlin@amu.edu.pl

La Estraro kore **dankas** la sinjorinon el Katalunio, kiu donacis al ILEI 2805.00 EUR por evoluigo de la Movado en Afriko.

Sukcese disvolviĝas **Forumoj por ILEI-gvidantoj**, lanĉitaj de la Prezidantino Mireille Grosjean.

La 2-an de julio okazis la sesa Forumo kun la Temo “ILEI-prioritatoj”. Partoprenis entute 12 personoj, estis diskutataj demandoj pri la ĉefa zorgo de ILEI – lertigado de profesiaj instruistoj kaj neprofesiaj instruantoj de Esperanto tra la mondo. Fine de la debato naskiĝis kelkaj iniciatoj. Unu el ili: kreado de la lernmaterialoj laŭ t.n. Peĉakuĉoj. Temas pri **mallongaj prezentaĵoj** pri iuj ajn temoj. Laŭ la skemo de «TED-talks» ILEI volas plie kolekti “16-minutajn maltedajn defiojn“. ILEI alvokas

ĉiujn instruemajn esperantistojn, prelegantojn kaj ne nur, simple interesatojn pri tiu temo partopreni kaj helpi al kreado de tiu biblioteko. Pli detale, bv, vidi ĉe: www.ilei.info

Eldonado

Post sukcesa laboro kaj eldonado de la Manlibro pri Instruado de Esperanto survojas preparlaboro pri eldonado de lernolibro pri EO en svahila.

La retejo Esperanto-Centroj pretas. Diskonigo venos.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

La skipo gvide de la redaktoro Jozefo Nemeth diligente laboris por regula eldono de la ĉefa organo de ILEI.

Juna Amiko (JA)

Same Juna Amiko plu aperas regule kaj kun interesa enhavo danke al la valora laboro de la redaktoro Stano Marcek kaj la skipo de la rubrikestroj. La Estraro alvokas ĉiujn esperantistojn pri vasta varbado de la “juvelo” de ILEI.

ILEI en la Reto

Daŭre aperas diversaj aktualaj informoj en kanaloj de ILEI en Fejsbuko, Jutubo, tra dissendolistoj. Rigardu la grupojn: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Esperanto + Edukado ILEI en Fejsbuko, en Jutubo.

ILEI strebas konigi ne nur la informojn pri siaj eventoj, sed pri instru- kaj kapabligaj iniciatoj kaj aranĝoj de aliaj siaj movadaj partneroj.

Kunlaboro kun enmovadaj institucioj

Kunlaboro kun UEA

ILEI aperas vige en la kadro de **VK, la Virtuala Kongreso de UEA**, kiu komenciĝos post du tagoj.

Jen la momentoj, kie la temo estos la laboro de la Ligo:

(Horoj laŭ UTC)

20-07 mardo 10:00:00 10:55:00 0:55:00 ViMF: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj -ILEI

20-07 mardo 12:00:00 16:55:00 4:55:00 Tago de Lernado, kun ok prelegoj

12.00-12.10: Salutoj: prezidantoj de UEA kaj ILEI

12.10-12.40: Duncan Charters: Paco kaj konfido en la mondo de edukado

12.40-13.00: Mireille Grosjean: Ne okazas lernado sen fido

13.00-13.30: Goro Christoph Kimura: Kio estas interlingva diverseco kaj kial ni bezonas ĝin?

13.30-14.00: Martina Kvarantan Šmitran: De aplaŭdo al konfido - filmita

14.00-14.30: Mónika Molnár: Konfido kaj memkonfido en la klasĉambro

14.30-15.00: diskuto

15.00-15.30: Katalin Kováts: Per kio kion kaj kiel instrui?

15.30-16.00: Dennis Keefe: Praktika bildvortaro, filmita
16.00-16.30: Vicente Manzano-Arrondo: Iniciato "Esperanta universitato"
16.30-16.50: diskuto
16.50-16.55: Fermo

21-07 merkredo 11:00:00 11:55:00 0:55:00 ViMF: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj -ILEI

22-07 ĵaŭdo 10:00:00 10:55:00 0:55:00 ViMF: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj -ILEI

23-07 vendredo 17:00:00 17:55:00 0:55:00 Fakkunsido de ILEI

UEA partnere kun ELiSo (Esperanto kaj Libera Scio), ILEI kaj E@I alvokis verki por la Esperanta **Wikipedio** cele atingi 300 000 artikolojn ĝis julio 2021. La tuta wikipedia projekto disponeblas jam en pli ol 320 lingvoj, kun pli ol 330 000 aktivaj uzantoj kaj pli ol 56 milionoj da artikoloj.

ILEI subtenis la proponon de UEA pri nova membro de la Honora Patrona Komitato (HPK), nome la brazila verkisto Marco Lucchesi.

Daŭre regule aperadas informoj pri ILEI-eventoj en la ILEI-UEA-komuniko "Esperiga Komuniko" EKO.

Edukado.net lanĉis novan sekcion, dediĉitan por la kvara eldono de la Manlibro pri instruado de Esperanto, eldonita en decembro 2020, kaj koncernaj informoj, aldonaĵoj kaj organizas virtualan prelegserion kaj seminarion baze de la libro. La programo komenciĝis la 5-an de junio kaj laŭplane okazas en sinsekvaj semajnoj dum la somero. La eventoj celas helpi al la aĉetintoj pli bone kompreni la libron, trastudi ĝin, kompreni kaj bone utiligi ĝin.

Komence de julio ILEI subtenis la novan iniciaton de Edukado.net: la enketon pri lernolibroj de Esperanto. La Estraro alvokas ĉiujn siajn membrojn partopreni la enketon kaj tiel helpi al insruado de Esperanto kaj kapabligo de aliaj instruistoj. Jam venas respondoj.

La Estraro komencas pripensi pri ebla kunlaboro kun KosmoStrategio pri subvencipetado enkadre de la nova programo de EU **Erasmus+** 2021-2027. Flanke de la Estraro en la seminarioj de KosmoStrategio partoprenis Radojica Petrović, Elena Nadikova kaj Unika.

Dum tiuj tri monatoj la prezidanto sendis **salutmesaĝojn** al:

- Kongreso de SAT-amikaro
- Esperanto Plus, kiu fariĝis nova Faka Asocio de UEA
- Seminario de Katalin Kovats por lertigi geinstruistojn
- Somera Esperanto-Studado (SES) organizita de E@I
- SAT, kiu havas kongreson kaj festas centjariĝon.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn! La Estraro de ILEI aparte dankas al Marija Belošević pro ŝia efika helpo en la starigo de nunaj ILEI-aktivaĵoj (du kongresoj).

Sekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

2021-07-15